

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 3 Marto, 2013

## N<sup>o</sup> 100

*Kara Leganto, neatendinte, preskaŭ kaŝe ni atingis 100-an numeron de nia bulteno. Mi memoras, kiam antaŭ pli ol 8 jaroj, oktobre de 2004 d-ro Kordylewski proponis al mi aperiĝi "Saluton!", kion li lastfoje faris en 2000 okaze de Zamenhofa bankedo. Mi promesis, sed ekis iom timeme kaj skeptike samtempe. Kial? Unue, pli ol duono de tiesa enhavo estis en la angla, kvazaŭ ĝi estis eldonata ne por Esperantistoj – membroj de la sufiĉe forta E-kolektivo, sed celata por la ekstera, ne-Esperanta publiko. Due, mi ne estis sperta komputil-uzanto kaj eĉ ne havis personon, de kiu mi povus ricevi iun teknikan helpon – mi ja estis tute nova persono kaj en Usono, kaj en la E-societo. Sendube, ekzistis ankoraŭ kelkaj kaŭzoj ŝanceligitaj min. Sed poste multe helpis kaj vic-prezidinto d-ro Puramo Ĉong, kaj nia kasisto Karlo Gunn, kaj multegaj kontribuintoj de la bulteno. Dank' al ili ni atingis CENTON!*

*La redakcio ricevis abundon da salutoj kaj kontribuadoj de niaj legantoj el multaj partner-kolektivoj. Ne por ĉiuj estas loko en ĉi eldono, sed ili nepre aperos baldaŭ, en sekvantaj numeroj.*

*Dankon al ĉiuj, agrablan legadon!*

–La Redakcio

## Gratuloj!!!

Nome de Esperanto-USA, mi varme gratulas la Esperanto-Societon de Ŝikago pro seninterrompa eldono de cent numeroj de via bulteno. Mi ricevas en la C.O. kelkajn bultenojn de diversaj landoj, sed la bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago estas elstara, pro la interesa enhavo kaj la buntaj grafikaĵoj. –*Amike, Bill Harris, Esperanto-USA*

+ + +



Al la bela kaj interesa bulteno "Saluton" de Ŝikaga E-Societo la gesamideanoj de la ĝemeligita Milana Esperanto-Klubo, kies bulteno aperas sen interrompo ekde la jaro 1952, sendas varmajn gratulojn kaj sincerajn bondezirojn trafi samajn jardekojn da servodaŭro. –*Ermigi Rodari*

Kun granga ĝojo mi konstatas la aperon de la 100a eldono de nia bulteno "Saluton!" Mi gratulas la fakton al ĉiuj legantoj, kaj mi volas esprimi precipe elkoran dankon al la senlaca Redaktoro – Viktoro Pajuk. Dank al lia sindono "Saluton!" evoluis forme kaj enhance. Mi deziras al la meritoplena Redaktoro daŭrajn sukcesojn! –*D-ro Les Kordylewski, Prezidanto*

+ + +



Kijiva Esperanto-klubo "Ora Pordego", la Ukraina Esperanto-Asocio gratulas membrojn de la Esperanto-Societo el Ŝikago, la redakcion de la bulteno "Saluton" okaze de aperigo de 100 numeroj de la bulteno! Ni deziras al vi novajn poresperantajn atingojn, amon, sanon kaj feliĉon al viaj membroj! –*Volodomir Hordijenko*

+ + + + +

## Tempo

Estimata "Saluton", mi salutas vin okaze de cent numeroj de "Saluton", dezirante al vi novajn milojn da "Saluton", novajn festojn de novaj numeroj... Vi, malgranda gazeto en grandega urbo, gazeto skribita aŭ verkita en malgranda lingvo en ŝtato de grandega lingvo, kies voĉo pli bone kaj pli malproksime reeĥas ol grandaj gazetoj de via urbo, estas kaj restas fenomeno de unu bela ideo kiu ligas homojn.

Kara "Saluton", vi kiu ĉiam salutas, bondeziras, invitas por novaj renkontiĝoj, vi vere estas (kaj restos) neordinara mesaĝo de amikeco, komprenemo, bonvolo, kuraĝa gazeto de bonhumoro.

Restu tiel! Dezirante al vi ĉion bonan, longan vivon, riĉan enhavon mi amike salutas redaktan komitaton, eksajn, nunajn kaj estontajn redaktorojn. –*Amike kaj kore kaj poezie, Dimitrije (Beogrado, Serbio)*

Ni, homoj en tempo, sur Tero,  
eble ies ĵetita semo en spaco,  
vagaduloj sur planedo-bariero,  
ni daŭras dank' al ĝia donaco.

Diritas ke tempon oni devas gardi.  
Diru al mi, kie ĝin ni povus aĉeti?  
Permesu al mi tra tempo boardi  
kaj, kial ne, per piedo ĝin treti.

Oni diras – ĝi estas senpreza  
historia, senfina, perdita,  
nova, fora, senlima, peza,  
universala, reala, eble ŝtelita...

Nia tempo por nasko, kresko, matura,  
amo, serĉado, maljuneco, iro, reiro,  
tempo de rido, ploro, forgeso, memoro,  
ripozo, atendo, laboro, puno, admiro

Ne trovante bonajn respondojn,  
homo malcerta, nekompleta,  
funebradas ekzistantajn mondojn  
por ilia provizoreco hermeta.

Oni diras ke tempo estas mono.  
Ĉu vi povas vian tempon vendi?  
Ĉu sekundon, horon kaj eonon  
iam, ie, eble, oni povus mendi?

Diablo portu, ĝi multajn nomojn havas,  
eĉ junan, malnovan, oran, laboran, donitan,  
ni provas mezuri ĝin, sed ni nur lavas  
en ĝia daŭro al ni kurta, neniam difinita.

Ĉu nia daŭro estas ĝia mezuro?  
Ĝi restas – senfina, kaj ni – provizoro,  
nur rudimentoj de ĝia arkitekturo,  
ĝenerale ĉion kaŝos tempa pulvoro.

# Woody Guthrie en Esperanto

Se Woody Guthrie ankoraŭ vivus li estus centjaraĝa en la jaro 2012. Verŝajne pro tiu fakto mi lastatempe kelkfoje aŭskultis kantojn de li en radio-elsendaĵoj. Antaŭe mi neniam atentis pri tiu granda artisto. Vikipedio mencias la faman kanton 'This land is your land' kiun ankaŭ mi ofte aŭdis, eĉ en la esperanta versio 'Jen nia mondo', sed mi ne sciis ke tiun kanton Woody Guthrie verkis. Kaj li verkis multegajn aliajn elstarajn kantojn. Tiun aferon mi ankaŭ devis lerni.



Mia filo aĉetis por mi 5 kompaktdiskojn kaj kaptis min entuziasmo! Multaj nun jam 'maljunaj' kantoj okulfrappe troviĝas en aliaj nun 'modernaj' kostumoj de la popmuzika scenejo. Do, mi subite interesiĝis pri tiu verkisto.

Kortuŝita estas raportoj pri lia sorto... (daŭrigota)

–Klaus Friese, Germanio

## Akvobaraĵo

M: Grand Coulee Dam (Woody Guthrie)

Por kelka tempo Woody Guthrie trovis laboron en la kompanio kiu planis kaj konstruis la grandajn akvobaraĵon en la Grand Coulee-regiono. Tiu kanto helpis konatigi tiujn projektojn, do ĝi estis 'varbada kanto', tamen skribita en la tipa Woody-Guthrie-maniero, ĉu ne?

*Sep mirakloj en la mondo, sed plej granda vidindaĵ'*  
*El la turoj kaj ĝardenoj, kiujn eĉ vi konas jam*  
*estas nun mirinda en Onklo Sames land'*  
*Rivero-reĝ' Kolumbia kun la Grand Coulee Baraĵ'*


*Fontas la fluado en fora Kanado*  
*Torentas tra kajono ĝis al la sala mar'*  
*Okcidenten al sunsubiro ĵus en la ocean',*  
*Jes Grand Coulee regionon plej multe amas mi*

*Scintilas en nebulo per vento ŝauma sprej'*  
*Multaj fortaj viroj dronis per kruela akvokirl'*  
*Boatoj frakasitaj per fortoj de 'l river'*  
*Do sonĝo pri la venko realiĝis sur nia ter'*

*Akceptis Onklo Samo la defion en tridektri*  
*Por farmisto kaj fabriko kaj ankaŭ por vi kaj mi*  
*Li diris al rivero: Nur kuru al la mar'*  
*Sed ĉiam dum kurado laboru nun por mi*

*En Washington kaj Oregon fabrikoj zumas nun*  
*Produktas kromon kaj manganon, malpezan aluminion*  
*Kaj roras la motoroj plej taŭga por l' milit'*  
*danke al rivero kaj la Grand Coulee baraĵ'*

*Scintilas en nebulo per vento ŝauma sprej'*  
*Multaj fortaj viroj dronis pro furioza akvokirl'*  
*Boatoj frakasitaj per fortoj de 'l river'*  
*Do sonĝo pri la venko realiĝis sur nia ter'*



## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Anonimulo  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn  
828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**  
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**  
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda**  
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Aprilo – Prezidanta horo

28an de Majo – Temo estos anoncata

16an de Junio – Tradicia E-pikniko